La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-13 n-ro 354

# Eŭropo: radioaktiva nubo trapasis Eŭropon en septembro




Azoulay oficiale funkcios kiel ĝenerala direktoro de Unesko de UN

La 25a neoficiala konferenco de gvidantoj en APEK adoptis deklaracion

Fina ceremonio de jaro Zamenhof en UNESKO la 11an de decembro

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Eŭropo: radioaktiva nubo trapasis Eŭropon en septembro
*La rutenio-106 estas fisia produktaĵo devenanta de la nuklea industrio, aliparte uzata en kuracadoj p. 03*

Azoulay oficiale funkcios kiel ĝenerala direktoro de Unesko de UN
*Ekde la 15a de novembro p. 04*

La 25a neoficiala konferenco de gvidantoj en APEK adoptis deklaracion
*Subteni la plurflankan komercosistemon p. 04*

Hodiaŭe
*Ostap Viŝnja; Peter Härtling; Robert Louis Stevenson; kaj Germanio p. 05*

Kuracista promeso legebla en Esperanto
*Monda Medicina Asocio p. 06*

Fina ceremonio de jaro Zamenhof en UNESKO la 11an de decembro
*Tutmondiĝo, Reto, Kuriero de UNESKO: Kie staras Esperanto cent jarojn post la morto de sia iniciatinto? p. 06*

# Eŭropo: radioaktiva nubo trapasis Eŭropon en septembro

La informo ne multe diskoniĝis, tamen laŭ multaj francaj amaskomunikiloj, kaj la franca Instituto de Radioprotektado kaj Nuklea Sekureco (IRSN), radioaktiva nubo ja trapasis Eŭropon ĝis meze de oktobro.




La instituto fakte precizigis en raporto, la 3an de oktobro, ke la nivelo de rutenio-106 (metala izotopo el la platenfamilio, fisia produktaĵo el nuklea industrio, ankaŭ uzata en medicino) detektitaj en Eŭropo «ne estas danĝera, nek por la homa sano, nek por la medio».

**Sed de kie venas tiu radioaktiva nubo?**

Ĝis nun, neniu oficiala respondo pri la kialoj kaj la karaktero de tiu nubo estis provizita. Tamen, la origina punkto ŝajne estis malkovrita. Post kelkaj testoj, la IRSN lokalizis la plej kredeblajn areojn de tiu ellasiĝo. La origina punkto ŝajne situiĝas proksime de la riverego Volgo kaj Urala montaro (t.e inter Rusio kaj Kazaĥio).

Flanke de Rusio, la giganto pri nukleo *Rosatom* dementis ĉian problemon en siaj instalaĵoj. Tamen, flanke de Kazaĥio, neniu respondo estis provizita. Malgraŭ ĉio, la francaj kaj germanaj ekspertoj ŝajne akordiĝis por anonci, ke la radioaktiva nubo sendube originas de Rusio.

«La plej kredebla areo situiĝas inter Volgo kaj Uralo, kvankam precizigi la ĝustan lokon de la ellasiĝo ne eblas nun per la disponeblaj datumoj», opinias en noto la franca instituto de radioprotektado kaj nuklea sekureco (IRSN), fine de sia enketo.

Unu el la gravaj informoj, kiuj emfaziĝas el la raporto indikas, ke la infektado per rutenio-106 ne povas deveni de nuklea reaktoro. Ĉi-okaze, aliaj nukleaj elementoj estus trovitaj en la nuklea nubo. Tio estus do ellasiĝo en «instalaĵoj ligitaj al la ciklo de nuklea bruligaĵo, aŭ en fabrikado de radioaktivaj fontoj», laŭ la IRSN.

La IRSN hipotezas konsekvence, ke la ellasiĝo venas de instalaĵoj ligitaj al ciklo de nuklea bruligaĵo aŭ de fabrikado de radioaktivaj fontoj, sen identigi apartan areon.

La rutenio-106 estas fisia produktaĵo devenanta de la nuklea industrio, aliparte uzata en kuracadoj.

Neniam Milito Inter Ni

# AZOULAY oficiale funkcios kiel ĝenerala direktoro de Unesko de UN

La 10an de novembro la 39a konferenco de Unesko de UN okazis en Parizo, kaj tiam ĝi aprobis, ke Audrey AZOULAY, la eksa franca kultura ministro, oficiale funkcios kiel ĝenerala direktoro de Unesko de UN ekde la 15a de novembro.




Post tio AZOULAY diris, ke, kvankam Unesko de UN nun alfrontas multajn malfacilojn, tamen hodiaŭ, kiam la mondo alvizaĝas diversspecajn defiojn, la funkcioj de la organizaĵo ankoraŭ estas neanstataŭigeblaj em de la mondo. Ŝi rimarkis, ke ŝi, kun plena fervoro, penados por modernigo de la organizaĵo.

Xiong
Ĉina Radio Internacia

---


# La 25a neoficiala konferenco de gvidantoj en APEK adoptis deklaracion

La 11an de novembro la 25a Neoficiala Konferenco de Gvidantoj en la Azia-Pacifika Ekonomia Kunlaboro (APEK) fermiĝis en *Da Nang*, Vjetnamio. La konferenco adoptis deklaracion, kiu alvokas al la ekonomiunuoj, nome ĉiuj membroŝtatoj, subteni la plurflankan komercosistemon.




La deklaracio akceptita de la konferenco diras, ke la gvidantoj de la ekonomiunuoj el APEC decideme alprenos komunan agadon pli fortan kaj daŭrigeblan, por enmeti novan dinamikon en la organizaĵon APEK, akceli la permanentan, novokreivan kaj inkluziveman kreskadon, konstantigi la integriĝon de la regiona ekonomio, plene elfosi la talentan forton de la komercaj sektoroj, precipe de la mezaj kaj malgrandaj entreprenoj, kaj pliigi la sekurecon de nutraĵoj kaj de daŭripova agrikulturo.

Xiong
Ĉina Radio Internacia



## Ostap VIŜNJA

**Ostap VIŜNJA (ps. de Pavlo HUBENKO) ukraine Остап Вишня (1889-1956) - fama ukraina humuristo. Naskiĝis apud Zinkivo. Ekigis ĝenron de humuraĵ-rakontoj - ukraine "*усмішка*".**

**En Esperanto aperis: *Zenitka*.**

**Vikipedio**

## Peter HÄRTLING



**Peter HÄRTLING (naskiĝis la 13-a de novembro 1933 en *Chemnitz*, mortis la 10-an de julio 2017 en *Rüsselsheim*) estis germana ĵurnalisto kaj verkisto.**

**En Esperanto aperis: *Tia estis Hirblo: kiel Hirblo venis en la hejmon, Kial li estas malsimila ol aliaj, kaj ĉu estas eble helpi al li; Avinjo: la rakonto pri Kalle, kiu perdas siajn gepatrojn, kaj lia avino decidas zorgi pri li.***

**Vikipedio**



## Robert Louis STEVENSON

**Robert Louis (Balfour) STEVENSON [RObet LUis STIvnsn] (naskiĝis la 13-an de novembro 1850 en *Edinburgh*, mortis la 3-an de decembro 1894 sur la insulo Samoo) estis skota verkisto.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

**Falita arbo, *Dülmen*,**

**Germanio.**

**Vikipedio**

## Kuracista promeso legebla en Esperanto

La Monda Medicina Asocio (*World Medical Association*, WMA) kadre de sia pasinta internacia kunveno en oktobro [2017] reviziis kaj kompletigis la proponon pri *Promeso de la kuracistoj*, kiu estis unuafoje publikigita kadre de la *Deklaracio de Ĝenevo* en la jaro 1948. Grava novaĵo estas la instigo por gekuracistoj, ke ili atentu ankaŭ la propran sanstaton, kaj akcento al la aŭtonomio de la paciento.

La Esperanto-versio nun legeblas en la retejo de nia medicina faka asocio (vidu).

Komuniko de d-ro Christoph KLAWE
Prezidanto de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA)
EKO de UEA, n-ro 31

---

## Fina ceremonio de jaro ZAMENHOF en UNESKO la 11an de decembro

Por fini la Zamenhofan jaron, la pola delegacio ĉe UNESKO invitas al kunveno lunde la 11an de decembro, je la 9.30, salono XI. La ĝenerala temo estas "*Tutmondiĝo, Reto, Kuriero de UNESKO: Kie staras Esperanto cent jarojn post la morto de sia iniciatinto?*"



Post bonveniga kafo, salutos Krystyna ZUREK, ambasadorino de Pollando, kaj Maryse Wanda ZALESKI-ZAMENHOF, pranepino de la aŭtoro de Esperanto. Poste intervenos Sébastien MORET, doktoriĝanto ĉe la universitatoj de Ĝenevo kaj *Tallinn*, pri "*Kial Esperanto venkis?*"; Jean-Claude LESCURE, historiisto, pri "*Esperanto fronte al tutmondiĝo*" kaj Guilherme FIANS, el Brazilo doktoriĝanto ĉe la Universitato de Manĉestro, pri "*Esperanto nun kaj fronte al sia estonto: unu komunumo kaj ties komunikiloj*".

Post paŭzeto, Chuck SMITH, lanĉinto de la Esperanto-versio de Duolingo kaj de Amikumu, prelegos pri "*La modernaj komunikiloj je la servo de Esperanto*"; TREZORO Huang Yinbao, prezidanto de ĉina fondaĵo, pri "*Kuriero de UNESKO en Esperanto*"; Giorgio NOVELLO, ambasadoro de Italio en Norvegio kaj Islando pri "*Ĉu nova lingvo por UNESKO?*" Sekvos koktelo. La prezentoj estos ĉu en la franca ĉu en Esperanto kun samtempa interpretado.

Por ĉeesti, nepras enskribiĝi ĉi tie.

Informilo de Esperanto por UN, n-ro 31